

Alexander Puschkin,  
К....

Alexander Puschkin,  
Al....

Alexander Puschkin,  
Al...

*tradukita de Manfredo Ratisla-  
vo*

*tradukita de Manfred  
Retzlaff*

*Esperantigo laŭ la germana tra-  
duko de Karoline Jänisch*

*Esperantigo laŭ la rusa origina  
teksto.*

Я помню чудное мгновенье:  
Передо мной явилась ты,  
Как мимолетное виденье,  
Как гений чистой красоты.

Momenton vi ja estis mia,  
vi foje staris antaŭ mi,  
Vi pura ideal' gracia  
de l' belo efemera vi.

Memoras ofte mi pri tio:  
aperis iam vi al mi,  
samkiel fuĝa mir-vizio,  
de l' pura belo la geni'.

В томленьях грусти  
безнадёжной,  
В тревогах шумной суеты,  
Звучал мне долго голос нежный,  
И снились милые черты.

Dolor-espere sopirante,  
en la bruado de l' homar'  
la dolĉan voĉon ekaŭdante,  
mi songis pri l' okulo-par'.

En la turmentoj de l' ama-  
raj  
afliktoj kaj melankoli'  
aperis viaj trajtoj karaj,  
la mildan voĉon aŭdis mi.

Шли годы. Бурь порыв  
мятежный  
Рассеял прежние мечты.  
И я забыл твой голос нежный,  
Твои небесные черты.

Sed dum la viv-batal' multja-  
ra,  
dum la restado en la sol',  
paliĝis la memor' de l' kara  
aspekto via kaj parol'.

La jaroj pasis, forbloviĝis  
subite tiuj songoj ĉi,  
la belaj trajtoj ekpaliĝis,  
forĝesis vian voĉon mi.

В глуши, во мраке заточенья  
Тянулись тихо дни мои  
Без божества, без вдохновенья,  
Без слез, без жизни, без любви.

Mi jarojn en karcerro restis,  
ne kredis plu je l' kara Di',  
malplena mia brusto estis,  
ne ploris, vivis, amis mi.

Kviete pasis tagoj miaj  
en la ekzil', sen emoci',  
sen Dio, sen inspiroj iaj,  
ne ploris, vivis, amis mi.

Душе настало пробужденье:  
И вот опять явилась ты,  
Как мимолетное виденье,  
Как гений чистой красоты.

Saniĝas nun animo mia.  
Vi ree staras antaŭ mi,  
vi pura ideal' gracia  
de l' belo efemera vi.

Vekiĝis nun animo mia,  
kaj ree ekaperis vi,  
samkiel fuĝa vid' vizia,  
de l' pura belo la geni'.

И сердце бьется в упоенье,  
И для него воскресли вновь  
И божество и вдохновенье,  
И жизнь, и слезы, и любовь.

Nun ree batas kun pasio  
La vekiginta kor' en mi,  
denove ardas ĝi por Dio  
kaj vivas, ploras, amas ĝi.

Nun ree batas kun sentemo  
en mia brusto mia kor',  
inspir' revenis kaj kredemo  
kaj viv' kaj am' kaj ree plor'.

...

...

...

*Verkinto de tiu ĉi Rusa poemo estas*  
ALEXANDER PUSCHKIN (\*1799-05-26 – †1837-01-29).

*Arg-305-616 (2005-04-22 16:27:34)*

*Traduko de la Rusa poemo “K....” de ALEXANDER PUSCHKIN (\*1799-05-26 – †1837-01-29) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1984-05.*

*MR-153-2a / Arg-305-618 (2006-09-20 09:31:05)*

*Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, faris laŭ la germanigo de s-ino Karoline Jänisch (Pawlowa).*

*Traduko de la Rusa poemo “K....” de ALEXANDER PUSCHKIN (\*1799-05-26 – †1837-01-29) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2006-09-20.*

*MR-153-6 / Arg-305-730 (2006-12-04 12:17:37)*

*Esperantigis: Manfredo Ratislavo (Manfred Retzlaff, \*04.11.1938) en Decembro de 2000 laŭ la origina rusalingva teksto.*